# LA PACDEFENDANTO

N-o. 37 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Januaro 1955.

---

## M I A K R E D O A L L A P A C O

P. Alfredo MACEK, I. kanoniko de la Sankta Venceslaa Kapitolo en MIKULOV, ŝtata arĥivestro kaj meteorologisto en MIKULOV, membro de la estraro de la Distrikta komitato de pacdefendantoj:

Multfoje mi jam prelegis pri porpaca batalo, en Mikulov, en Brno kaj ankaŭ en Přerov. Ĉie mi konstatis la profundan senton de la homara por la paco. Paco gardas verkojn de la homoj kaj ankaŭ la verkojn de la konstruantoj de vera homara socialismo en kiu ĉiuj homoj estos fratoj kaj malamikeco malaperos. La Paco gardas infanojn, patrinojn kaj la familiojn, arton kaj sciencon, ĝi gardas nian hejmon kaj gepatran domon. Milito ĉiujn verkojn, kiuj estas kun granda peno konstruitaj, nur detruas. La paco estas profunda sento de homa koro.

Ĉiu esperantisto devas, gardi, verki kaj ĝoji pri paca laboro, ĉiu esperantisto devus esti pac-amanto. Kontraŭsentante li fariĝus malamiko de nia granda majstro, kiu fondis Esperanton por unuigi la homaron en grardan pacan familion.

Pro tio, ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj unuiĝu en nia granda familio de la ĉeĥoslovakaj esperantistaj pacdefendantoj. Tia laboro por la paco en la mondo, kian alportis la anĝeloj al Betlehemo (laŭ la kristana religio: rim. de red.) ne estas malhonesta aŭ nur politika, tia laboro estas vere homa kaj kristana agado - laboro althonesta kaj bela.

Ni ne permesu okazigon de terura atom- kaj hidrogen-bombmilito, kiu pereigus niajn urbojn kaj landojn. La Moskva-deklaracio vere estas „Magna Charto" de pacaj intencoj de popoldemokratioj. Ne miru, ke la popoldemokratioj havas armeojn! Ili ne estas por detrui blinde kaj kruele, ili havas la taskon nur defendi siajn landojn kontraŭ ĉiu, kiı dezirus ataki la pacan vivon de niaj popoloj.

Ho, kiel estus deziririda, ke malaperu ĉiuj tiuj armeoj en Okcidento same kiel en Oriento! -

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj amu la pacon! Verku, preĝu kaj batalu ĉiuloke kaj ĉiamaniere por la defendo de la mondpaco! -

Komentario de la redakcio: K-do. pastro Alfred MACEK estas jam malnova esperantisto. Antaŭ tri jaroj, kiam fondiĝis nia esperantista pacmovado, li estis unu el la unuaj, kiuj tuj aliĝis al nia movado kaj fariĝis entusiasma leganto de nia bulteno. Kiam fondigis antaŭ unu jaro la MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO en Sankt Pölten, pastro A. Macek aliĝis ankaŭ tie kaj fariĝis abonanto de "PACO". Nun li skribas, ke li ĉiam kun malpacienco jam atendas la alvenon de niaj pacgazetoj, kiujn li ofte du-foje sinsekve tralegadas. Se vi kredas, ke nia k-do pastro kanoniko A. Macek povus per prelegoj kontribui al via peresperanta porpaca movado, li estas preta ankaŭ tiun taskon plenumi. Kompreneble la aranĝanto devus pagi al li la vojaĝ-elspezojn.

Interesuloj, kontaktu rekte kun li.

La adreso estas: K-do. Alfred MACEK, kanovník, MIKULOV, Moravio.

Ne forgesu aldoni respondpoŝtmarkon.

## M O D E L A J   S O L D A T O J

Oni ofte aŭdas paroli pri "armeoj de paco", sed ni povas al vi fakte prezentí du verajn pacarmeanojn:

Estas la soldatoj, k-doj Kiril Viĉev KOLEV kaj Asen Ivanov DOČEV Bulgario. La urbon kie ili deĵoras ne konvenas mencii. Ili estas jam aktivaj membroj de MONDPACA

ESPERANTISTA MOVADO kaj en la senco de nia MEM-manifesto gvidas rondeton de 25 soldatoj kaj oficiroj (popolarmeanoj) al kiuj ili instruas rekte en la kazerno Esperanton. Ĉiuj estas abonantoj de ESPERANTISTA-LABORISTO (el Francio) kaj ankaŭ abonantoj de "PACO". Kun tiuj k-doj. eblas kontakti pere de k-do. Boris. Angelev VELEV (peranto de MEM) Stalin str. 5, GOCE DELČE, V. Bulgario. Propag. materialo dezirata.

## BLINDULO GVIDAS ESPERANTOKURSON POR VIDANTOJ

K-do. František BŘEZINA en Žďár nad Sázavou estas malgraŭ sia blindeco fervora esperantisto. Dum la germana invado al ČSR li estis pro sia persista Esperanto laboro suspektita kaj arestita.

Resaniĝante post la liberigo li revenis al sia ŝatata okupo kaj raportas nun jene pri ĝi:

Mian kurson partoprenas nun 9 personoj. Ĝi okazas ĉiu merkrede de la 19. horo en la urba muzik-lernejo. Pere de flugfolioj, ricevitaj de nia blindula revuo "AŬRORO" kaj post 3foja disaŭdigo fare de nia urba kaj uzina radio, mi plue propagandas Esperanton. Mi sukcesis konvinki la aŭtoritatojn de nia Distrikta Nacia Komitato, ke kursoj de Esp-o servas al la paco. Sekve tiu komitato pagas la kursejon. La kursanoj jam komencis korespondadi kun eksterlando. La unuaj tri ricevitaj respondoj kaŭzis grandan ĝojon kaj kuraĝigas la aliajn. Estus dezirinda, ke niaj kursanoj ricevu ankoraŭ pluajn kuraĝigajn leterojn. Tiajn eblas sendi al jena adreso:
K-do Fraritišek Březina, Kurs Esperanta, Hudební škola, Ž Ď Á R nad Sázavou; Ĉeĥoslovakio.

## EKSTERLANDAJ GEK-DOJ ATENTU!

En Ĉeĥoslovakio estas granda intereso pri la broŝuro "BAPTO DE CARO VLADIMIRO" de K. H. Borovský, eldonita en Karariaj insuloj. Kiu povas sendi al nia redakcio tiun broŝuron ricevos por unu ekz. 1 jarabonon de nia bulteno. Ni havas akcepti mil ekzemplerojn kaj ankaŭ ni kapablas liveri 1.000 jarabonojn rekompence al eksterlandaj gek-doj.

Ĉeĥosl. gek-doj, kiuj deziras mendi tiun broŝuron, anoncu tion al la redakcio per poštkarto.

## SPERTOJ DE ĈEĤOSLOVAKA MUNTISTO

Jam de longe ni ne vizitis nian Esp-klubon en Plzeň, sed bedaŭrinde ne estis ankaŭ oftaj la tagoj, kiujn mi povis travivi hejme en mia familio. Dum tutaj du jaroj mi ĉiam vojaĝis kaj laboris ekster nia urbo. La muntista profesio havas siajn mallumajn flankojn, sed ankaŭ lumajn. Pri la lastaj mi volas al vi iom rakonti el esperantista vidpunkto.

Se mi jam diris, ke mi dum 2 jaroj vojaĝis kiel muntisto, mi devas ankaŭ mencii, ke dum tiu tempo mi laboris preskaŭ en ĉiuj ĉehoslovakaj regionoj kaj ĉie mi trovis eblecon kaj okazon paroli esperante, ĉar mi tiun okazon serĉis kaj ankaŭ ĉiam trovis. Multfoje mi havis veran feliĉon, ĉar mi trovis esperantistojn ankaŭ tie, kie mi ilin apenaŭ supozis. Ofte mi havis okazon defendi Esperanton kontraŭ diversaj personoj, kiuj akre kaj mi povas diri, ankaŭ demagoge kontraŭis ĝin. Estas vere ridinda afero, ke tiuj personoj neniam havas faktajn argumentojn kontraŭ nia lingvo kaj movado. Estas eble interesa, ke tiuj kontraŭuloj estis ĉiam gravaj funkciuloj, kiuj fine ne sciis kion respondi al mi kaj al la aŭskultantoj de nia debato, kiuj ĉiam forte interesiĝis pri Esperanto, ĉar havis nek okazon ĝis nun aŭdi ion pri nia lingvo kaj la homoj, kiuj ĝin uzas.

Vi certe pardonos al mi nur mallongan rakonton pri pasia kontraŭulino de Esperanto. Eble antaŭ unu jaro mi vojaĝis en rapidvagonaro hejmen el Ostrava. Mi dormis en angulo de la kupeo. Ankoraŭ 5 aliaj vojaĝantoj troviĝis en mia kupeo. Kiam la vagonaro haltis en Česká Třebová aliris virino, proksimume 35 jara. Kiel mi eksciis el ŝia parolado, ŝi estis instruistino de rusa lingvo. Ŝi parolis kaj parolis, sed mi jam ne povis dormi. Nur mi ĉiam restis sub mia surtuto. Ŝia parolado komencis interesi min, kiam ŝi diskutis kun kelkaj viroj pri lingvaj problemoj, poliglotismo kaj pli poste pri Esneranto. Tio estis veraj sensencaĵoj per kiuj ŝi argumentis kontraŭ Esperanto kaj esperantismo.

Kompreneble, ke ni jam ne povis aŭskulti plu tiujn mensogojn kontraŭ nia movado. Mi flankenŝovis la surtuton kaj intervenis en la por mi tiel ofendeman diskuton, ĉar mi konstatis, ke

neniu el la diskutantoj estis vere informita pri nia celo kaj tute ne pri nia lingvo. Mi klarigis al la kunvojaĝantoj, kio Esperanto fakte estas. Donante ekzemplojn el la gramatiko kaj raportinte pri la historio de nia movado, mi tuj sukcesis havi ĉiujn aŭskultantojn je mia flanko kaj ĉiuj simpatiis kun nia lingvo kaj ideo. La instruistino, vidinte, ke ŝi jam nenion povas diri kontraŭ kaj ĉiuj ŝiaj argumentoj mntriĝis malsaĝaj, debutis per la vortoj: "Tiaj homoj kiel vi estas, devus paroli ĉiuj ruse kaj la situacio aspektus tuto aliel!"

Mi jam nenion alian povis fari ol respondi ruse kaj plu ankoraŭ demandi ruse. Sed, kia estis mia surprizo: La instruistino ne kapablis bone respondi al mi nek per la rusa lingvo. Al ŝia argumento pri kosmopolitismo, mi prezentis al ŝi kelkajn Esp-pacgazetojn kaj tradukis nacilingven la titolojn kaj tiu debato Esreranto venkis centprocente.

Mia granda revo estis, kiel ĉe ĉiu alia esperantisto kaj juna homo, viziti ankaŭ foje eksterlandon: Kaj mi ĉiam deziris havi eblecon povi partopreni eksterlandan muntaĵon. Mi estis jam aliĝinta al pariza SAT-kongreso, kiun bedaŭrinde mi ne sukcesis viziti, sed mia malnova revo tamen efektiviĝis, kaj mi povis reprezenti nian popolon kaj esperantistaron en proksima eksterlando-Hungario. Mi povas diri, ke mia muntista profesio plenumas miajn revojn pli rapide ol mi pensis, ĉar en tiu tempo kiam vi tute agrable travivos la Kristnasko-festojn en viaj rondoj, mi denove troviĝos en eksterlando kaj festos tiujn tagojn de paco kaj reciproka amo ĉe la montpiedoj de la Transilvaniaj Alpoj, en la amika Romanio. Mi ne esperas, sed mi kredas, ke ankaŭ tie mi denove renkontiĝos kun esperantistoj, kvankam mi tie ne havas korespondantojn.

Sed nun mi jam devas raporti al vi pri mia restado en Hungario. Akceptu korajn kaj vere amikajn salutojn de ĉiuj hungaraj esperantistoj kun kiuj mi sukcesis renkontiĝi en la urboj Szentes kaj Hodmezövasarhely. Du monatojn mi travivis en tiu lando kaj multajn rememorojn mi kunprenis, sed mi devas konfesi, ke la plej belaj estis tiuj, de nia amika renkontiĝo. Bedaŭrinde mi povis travivi nur tri tagojn inter miaj esperantistaj amikoj. Sed mi devas diri, ke tiuj tri tagoj signifas por mi tutan romanon pri novaj spertoj, pruvojn de grandega amikeco kaj homa amo, nur pro tio ke mi parolas esperante. Tiuj homoj ĉion kredis, kion mi diris, ĉar mi parolis esperante kaj neniu el la hungaraj esperantistaj geamikoj allasis la penson, ke mi povus ankaŭ fanfaroni aŭ mensogi.

Ili sciis, ke mi estas esperantisto kaj tio sufiĉis por la fakto, ke mi estas honesta homo kaj esperantistoj ne mensogas.

Jes karaj gek-doj, neniu povas tion kredi, kiu tion ne persone spertis, egale en kiu ajn eksterlando. Esti esperantisto, signifas esti en eksterlando simbolo de homa honoreco kaj de vera amikeco. Kiam mi unue aŭdis pri Esperanto, ankoraŭ kiel ĉeĥoslovaka soldato en la jaro 1949, mi ne sciis ankoraŭ, ke pere de tiu lingvo mi foje trovos en la mondo tiom bonajn kaj sincerajn amikojn. Esperanto ne signifas nur internacian lingvon, sed ankaŭ honoron, senliman amikecon, grandegan konfidon kaj tion plej gravan, kio tiutempe ofte mankas inter la popoloj - la amon de homo al homo. Estas por mi vera honoro, ke mi nun povas konfesi al vi, ke mi estis fiera pro la fakto, ke mi estas esperantisto. Mi kunprenis al la hungara muntaĵo ankaŭ mian gitaron, por povi prezenti al la hungaraj esp-istoj niajn belajn popolkantojn, kiujn mi tiom ŝatas kaj mi ankaŭ kantis ilin al miaj amikoj, kiujn mi renkontis en tiuj du urboj. Sen fanfaroni, niaj kantoj tre plaĉis al la hungaraj geamikoj.

Kiel granda estis mia surprizo, kiam la ges-anoj, kiuj gastigis min nur kelkajn horojn en la urbo Hodmezövasarhely petis min kanti la ĉeĥoslovakan himnon, kiun ili ankoraŭ neniam aŭdis. Kredu al mi karaj gek-doj, ke mi havis larmojn en la okuloj, kiam mi ludis kaj kantis la himnon kaj ĉiuj hungaroj, inter ili multaj, kiuj ankoraŭ ne komprenis bone Esperanton, ekstaris kaj tute silente aŭskultis nian belan himnon. Estas ne forgeseblaj momentoj kiujn oni povas travivi. Jam horon mi sidis en la salono, kiam malfermiĝis la pordo kaj alvenis saluti min iom pli maljuna esperantistino – virino el kamparo – kiu devis vojaĝi por tiu momento multajn kilometrojn per vagonaro. Ŝi restis stari meze de la pordo kaj tute forgesis siajn parolojn, ŝi nur donis al mi sian malmolan manon kaj sen vortoj ŝi komencis - -- plori.

Kiom mi povis diri al tiu bonkora virino, karaj gesamideanoj? mi premis ŝian manon, donis al ŝi fratan kison kaj diris nur: Dankon, kara patrino, mi ĉion komprenas, kion vi volus diri al mi. Pli poste ŝi jam tre bone parolis esperante kaj mi eksciis, ke ŝi konas Esperanton nur post unujara

lernado, kaj mi estas la unua eksterlanda esperantisto, kiun ŝi renkontis. Neniam mi forgesos tiun samideanon, kiu sole ne sciis, ĉu li pli bone parolas slovake aŭ hungare, sed kiu diris, ke plej perfekte li majstras Esp-on. Li ankaŭ bonvenigis min en la stacidomo en flua slovaka lingvo. Mi neniam forgesos vin, karaj Ŝani Sipoŝ kaj Sedor Ferenc, vin karaj geedzoj Bacsu, vin kara Julia Toth, la patrinon de Esperanto en Hosmezövasarhely kaj ĉiujn ceterajn gesamideanojn, kiuj min tiel kore kaj frate akceptis en sia bela hungara patrio. La hungaraj gek-doj havas malfacilan situacion, sed ili kuraĝe laboras por nia afero. Ili ĉiuj volus ankaŭ viziti nian landon por konvinki sin, ke per Esp-o parolas ankoraŭpluaj homoj, fremdaj laŭ nacio, sed proksimaj kaj frataj dank' al nia lingvo kaj ideo. La hungaraj k-doj batalas kuraĝe, ili bezonas nur vian helpon. Mi promesis al la hungaraj k-doj nian helpon.

En Hungario la situacio por Esperanto estas pli mizera ol en nia lando. Kelkaj iam eminentaj hungaraj esperantistoj fariĝinte partianoj pozicias nun negative al Esperanto. La fama hung. esp-ista poeto Julio Baghy blindiĝis kaj vivas en Budapeŝto. Aliaj esperantistaj entuziasmuloj, kiuj havas ankoraŭ sufiĉan forton batali por nia afero, al tiuj mankas financaj rimedoj por propagando. Iliaj klubejoj troviĝas en iliaj loĝejoj.

Karaj gek-doj, mi vokas vin, ne lasu tiujn hungarajn k-dojn solaj kaj helpu al ili almenaŭ per viaj konsiloj kaj kuraĝigaj vortoj, kiuj signifas por ili fortodonan subtenon. Mia vizito ankaŭ multe kontribuis en tiu senco. Ni ĉeĥoslovakaj muntistoj bone reprezentis nian nacion kaj konvinkis la hungarajn laboristojn, ke ni tute nenion havas kontraŭ la hungara nacio kaj nia deziro estas nur daŭra amikeco kun ĝi. Kaj nia plej ŝatata celo estas la mondpaco.

Vivu Esperanto en la tuta mondo!

Vivu la paco kaj nia movado!

František KASTNER
PLZEŇ

## IOM PRI NIA SITUACIO EN DĚČÍN

Eble vi jam scias, ke nia Esp-grupo na plu ekzistas. Certe ne pro malintereso de niaj klubanoj, sed pro tre malfavoraj cirkonstancoj sub kiuj ni tie devis labori.

Aliĝinte al fervojista uzina klubo, ni komence ĝuis sufiĉan simpation. Ni ricevis propran klubejon, bele kaj komforte ekipitan, hejtigitan kaj lumigitan. Ĉion tute senpage. Ni komencis labori kredinte, ke ne okazigos ŝanĝo. Ni publike prelegis, aranĝis kursojn, ekskursojn en la naturon ktp. Mi estis elektita prezidanto de la klubo kaj devis zorgi pri 14 ĝiaj fakaj rondetoj.

Laŭordone mi ĉıumonate  sendis raporton pri la agado de la klubo al la centro en Praha (verŝajne tro favorajn pri la Esp-rondeto).

Subite kaj ne atendite alvenis du lingvoprofesoroj, kiuj ĉeestis en nia rondo tutan vesperon. Ili deklaris, ke ili ne venis por likvidi nian rondeton, sed por ĝustigi nian agadon, kiu laŭ ilia koncepto estis erarplena. Mi prezentis amason da diversspeca materialo, kiun mi dum longa tempo kolektis. Kvankam ili malatentis ĉion, ili tamen laŭdis nian energion kaj laboremon. Ili rekomendis al ni anstataŭ Esperanton, instrui la rusan lingvon. Ni respondis, ke neniu el ni kapablas tion, ĉar neniu majstras ĝin tiom por povi mem instruadi. Post duonjaro ni estis maldungitaj kaj oni eĉ intencis forpreni nian kluban posedaĵon, kiun ni pene kaj dank' al nia laboremo kaj ŝparemo sukcesis aĉeti. Sed tio ne sukcesis. Ni fariĝis izoluloj, sed malgraŭ tio ni ĉiuj korespondas kun eksterlando, kion ankoraŭ neniu malpermesis.

Antaŭ tri monatoj mi interkontaktiĝis kun la virina packomitato de nia urbo, kiu renkontiĝis min kun sincera kompreno por nia afero. Tio okazis kian mi montris kelkajn "Oomoto"-bultenojn kun bildoj kaj artikoloj pri atom- kaj hidrogen-bomboj. Krome mi poste povis prezenti tradukaĵojn el "PACO" kaj "LA PACDEFENDANTO", bonegaj por la defendo de la paco kaj mi povas diri, ke la ĉeestantoj proklamis, ke ili ankoraŭ neniam legis kaj aŭdis tiom da interesaj kaj samtempe instruajn informojn pri tiuj teruraj armiloj. Oni petis min aranĝi publikan prelegon, ĉar la defendo de la paco, kiu ja estas tiom endanĝerigita, meritas la atenton kaj subtenon de ĉiuj veraj pacamantoj.

Mi nun atendas alvenon de materialo rekte el Japanio, kiu konsistos el diversaj publikaĵoj. Se oni sukcesos aranĝi tiun prelegon, kiun mi akompanus per dokumentaj lumbildoj, la sukceso estos centprocenta, ĉar tiuj venis el lando, kiu proprasperte suferis la atom- kaj hidrogen-atakojn. Ankaŭ en mia ĉirkaŭaĵo kaj laborejo mi certe rakontas al interesuloj pri tiuj teruraj armiloj, kiuj kuŝas pretaj ĉe kelkaj sanaviduloj por ekstermi la homaron.

Mi estas certa, ke malfrue ni bedaŭrus nian malatenton kaj neintereson, kiu ankoraŭ nun ekzistas rilate tiuj ĉi armiloj.

Mi spertiĝis, ke plejparte niaj samlandanoj volas pacon, ili interesas pri tiuj ĉi inferaj inventaĵoj. Bedaŭrinde ekzistas neniu krom ni, esperantistaj pacdefendantoj, kiuj povus al ili klarigi ĉiujn teruraĵojn kaj turmentojn, kiuj nin ĉiuj atendas, se ni malobeos la voĉon de nia konscienco kaj dediĉos nian atenton nur al flankaj aferoj. Kaj jen ni stariĝu esperantistaj pacdefendantoj, por alten kaj forte levi nian voĉon kaj sentime diri al ĉiu, kio nin atendas. Ĉiu el ni havas la eblecon krei ĉirkaŭ si rondeton da kunlaborantoj, kiuj vole aŭ nevole disvastigu niajn informojn pri ĉiuj teruraĵoj de ambaŭ bomboj. Precipe ni prezentu krom la vortoj, ankaŭ bildojn, broŝurojn kaj aliajn tiurilatan dokumentan materialon. Neniu ja krom ni havas tiajn vastajn rilatojn kaj pro tio ni kuraĝe klarigu kaj batalu kontraŭ ekflamo de nova mondmilito! Ni ne timu, ĉiuj ja volas kun ni la pacon kaj ni plenumas nur nian honestan devon, laŭ ordono de nia konscienco.

Václav RŮŽIČKA
DĚČÍN

## NIA TUTŜTATA KUNVENO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ

Kompare al la graveco de tiu ĉi kunveno ni ankoraŭ ricevis ne sufiĉajn instigojn kaj proponojn. Nur oni ĝenerale konsentas, ke la kunveno okaziĝu somere dum la libertempoj kaj daŭru 5-7 tagojn por poví pritrakti ĉiujn necesajn problemojn rilate nian movadon.

La urbo por la kunveno:

Laste ni informis, ke niaj k-doj proponas por kunveni la urbojn Doksy, Olomouc kaj Brno. Ĝis la redakcia fermo ni nur eksciis, ke la gek-doj de Olomouc kaj Ostrava intencas tiun aferon pritrakti dum ilia komuna regiona kunveno la 8-9. de januaro en Olomouc.

Ĉar la rondeto en Olomouc ŝajnas ĝui la plej bonan pozicion, estus tre dezirinda, ke ili akceptu aranĝi la Tutŝtatan kunvenon en tiu urbo, kiu situas preskaŭ en la centro kaj estas egale atingebla el ĉiuj partoj de nia ŝtato. Plue niaj tieaj gek-doj jam preskaŭ tradicie kunlaboras kun la regiono de Ostrava, ili pro tio povas kun certeco ankaŭ kalkuli kun ties helpo. Ni esperu, ke la k-doj, tuj post la konferenco de ambaŭ regionoj en Olomouc informos nin pri siaj decidoj. Kompreneble, tio ne signifas, ke ne ankaŭ aliaj urboj povas proponi al ni gastigon de nia kunveno. Estus tre dezirinda, ke ni povu jam en nia februara eldono prezenti al niaj legantoj viajn proponojn kaj pluajn instigojn por la kunveno. Ankaŭ la aktoroj, poemverkistoj, kantistoj kaj aliaj sendu al ni siajn programojn, rilatante la pacmovadon por la kultura kaj amuza parto de nia kunveno.

La intereso partopreni la kunvenon jam nun montriĝas tre granda, eĉ eksterlandaj gek-doj preparas sin alveni Ĉeĥoslovakion por povi partopreni harmonian familian rondon. Ĉiujn instigojn, proponojn kaj program-aliĝojn direktu al k-do Rud. BURDA, PLZEŇ, Palackého nám. 6.

## KONTRAŬ REARMIGO DE GERMANIO

Kial ni esperantistaj pacdefendantoj estas kontraŭ la rearmigo de Okcidenta Germanio? La rearmigo de Germanio estas akceptata diference en la landoj de la du kontraŭ si starantaj ŝtatblokoj. La unuaj asertas, ke rearmigo de Germanio kondukas al revivigo de la germana militismo kaj fine al nova agreso kontraŭ la popoldemokr. ŝtatoj, kiuj prave sin sentas minacataj. Ankaŭ aliaj nacioj kruele spertis la germanan militarismon kaj prave timas ĝian renovigon.

La aliaj kredas sin ne sufiĉe fortaj sen la germana militarismo, por povi kontraŭstari kaj

rebati eventualan agreson de la sovjeta bloko. Tiun blokon gvidas ĉefe kapitaliştoj, kiuj timas perdi siajn posedaĵojn. Mi opinias, ke la rearmigo de Okcid. Germanio povas neniel grave kontribui al la defendo de la kapitalista reĝimo kontraŭ la komunismo, ĉar same ankaŭ la popoldem. bloko povas starigi kontraŭ ĝi rearmigitan Orientan Germanion (DDR). Tio povus konduki al fratbatalo, de Germanoj kontraŭ Germanoj. Finfine ambaŭflanke ni povus ĝui atom- kaj hidrogenbomban militon.

Jen la kaŭzo, kiu instigas nin rifuzi ĉiun ajn rearmigon. Ni devas rifuzi la rearmigon de Okc. kaj de Orienta Germanio, ĉar kiam ni batalas por ĝenerala senarmigo, estus absurda konsenti kun la enkonduko de militarismo en ŝtaton, kiu jam estas senarmigita. Ni ne nur devas persiste batali kontraŭ la rearmigo de Germanio, sed ni samtempe klopodu propagandi kaj disvastigi la postulon por senarmigo de ceteraj ŝtatoj, por internacia kontrolo de atom- kaj hidrogen-energioj kaj ties uzon nur por pacaj konstruaj celoj, kiuj servus al la homaro. Tiel ankaŭ postulas la Monda packonsilantaro.

Rudolf BURDA

## MONTEVIDEO

Laŭ informoj el "SAT-amikaro" n-o, 101 de dec., la pariza radiofonio raportis la 11. de decembro je la 13a horo, ke la ĝenerala konference de UNESKO en sia lasta kunsido aprobis Esperanton kiel universalan mondlingvon kaj la rusan kiel lingvon de labor-kunsidoj. Necesas, ke niaj legantoj tiun ĉi favoran novaĵon ĉiuokaze disvastigu, ĉar niaj gazetoj ĝis nun pri tiu grava decido konservas silenton.

R. BURDA

## AL NIAJ ABONANTOJ

Kun tiu ĉi n-o. ni sendas al vi poŝtpagilon por ke vi povu pagi la jarabonon por 1955. Ne forgesu sur ĝia parto por komunikoj noti por kio vi pagas kaj vian ĝustan adreson. Por la Pacdefendanto necesas pagi 12.- Kĉs. Por viaj eksterland. amikoj 13.- Kĉs. La adreson skribu preslitere! Eksterlandaj gek-doj povas ankaŭ aboni rekte ĉe nia red. kontraŭ sendo de 12 int. resp. kup. aŭ samvalora esperantaĵo. La jarabono por "PACO" faras 13.- Kĉs (por eksterlandaj k-doj abonebla nur ĉe ilia landa peranto.

## NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

MLADECKO okr. Opava, Esp-rondeton de 15 gelernantoj el Meza lernejo gvidas lernejdirektoro Jan Hadámek.

BRNO, okaze de la 95. naskiĝtago de L. L. Zamenhof aranĝis la Esp-rondeto de la Kult. Domo solenan vesperon kun riĉa programo. Kantisrĥoro "Javorina" de Agrikultura Altlernejo en Brno prezentis kantojn de Moravia Slovakio en ĉeĥa kaj Esp-lingvo.

LÁZNĚ BÍLINA en tiu loko ĝis nun ekzistas nur 2 esp-istoj, k-do Prokop kaj la estro de la Kult. Domo k-do Koláček. Ili promesis komenci propagandon, kunligante ĝin kun lumbild-parolado de k-do. Pech el Plzeň.

TĚCHONÍN pošta MLADKOV, en tiu loko ni havas unu solan esp-iston, k-don Stan. Werner, sufiĉe lingvoscia por aranĝi kurson kaj fondi grupon, sed li kredas, ke nia rondeto en TRUTNOV, kie li estas membro, faros tiun laboron anstataŭ li.

OLOMOUC, la 8-9. de jan. okaziĝos kom. laborkonferenco de la regionoj Ostrava kaj Olomouc. Gek-doj el aliaj lokoj estus kore invitataj. Nova kurso komencos en januaro. La 4-9. de jan. okazos instrua seminario en la Ekspozicia pavilono en kies kadro prelegos la 9/1. reprezentanto de la regiona packomitato pri la temo "Laboruloj de la tuta mondo defendas la pacon". Regulaj kunvenoj: ĉiu ĵaŭde de 19-21. kaj ĉiu marde de 18-20. horo en la Uzina klubo de Hospodář. podniky / Smetana-parko.

DĚČÍN, dank' al la aktiveco de nia fervora k-do V. Růžička kontribuis jam kelkdekoj da ĉiurbaj lernejinfanoj per siaj verkoj al la japana eldonejo HEIBONSYA por la projektita volumaro de INFANOJ EN LA MONDO. La verkoj estas jam forsenditaj akompanate de valoraj fotoj, kiujn

"k-do V. Růžička mem pretigis.
PLZEŇ, la 13. de dec. okazis vespero honore al la 95. naskiĝtago de L.L.Zamenhof, kiun partoprenis 30 gek-doj. Nia junularo sub gvido de k-do Hořejší kaj k-dino. Šloufová sukcese prezentis tiurilatan programon. Estis sendita solidarec-esprimo, subskribita de ĉiuj ĉeestantoj al la urba konsilantaro de Coventry (Angl.) La grupo decidis por 1955 membro-kotizon de 20.- Kčs inkluzivo la jar-abono por LA PACDEFENDANTO.
PŘÍBOR k-do. Sattek kontribuis per 2 infanaj verkoj al la eldonejo de HEIBONSYA en Japanio.
PRAHA, en nia ĉefurbo jam troviĝas pli ol 60 abonantoj de L. P. kaj de PACO. K-do Zmeškal vere bone zorgas pri nia "MIGRANTA BIBLIOTEKO", kiu jam konsistas, dank' al la oferemo de niaj en- kaj eksterlandaj gek-doj el multaj interesaj ekz-oj. Ĉiu abonanto povas kontraŭ pago de sendkostoj elprunti librojn laŭ sia plaĉo. Petu katalogon ĉe nia bibliotekisto: K-do. Alois ZMEŠKAL, Celetná č. 2, PRAHA I.
MIKULOV, nia k-do. kanoniko Alfred MACEK, membro de la estraro de la Distrikta Packomitato en Mikulov en ties kunvenoj regule mencias raportojn aperintajn en PACO kaj L. P. Du foje li prelegis tie pri esp-ista pacdefenda laboro. Por fondi grupon la tempo ankoraŭ ne maturiĝis. Esp-pacgazetoj estas publike elmetitaj en legejo de Kultura domo.
KOPŘIVNICE, en ekspozicio pri Popola Ĉinio estis prezentitaj fotoj kaj afiŝoj, ricevitaj pere de Esperanto. En nia uzina gazeto "TATROVÁK", kiun eldonas la uzina köm. partio, sindikato kaj junular-organizo, aperis du leteroj de k-do. Balague, sekretario de MEM, kaj de k-do. R. Farail el Bordeaux responde al alvoko de nia grupo rilate la konferencon en Moskvo.
BRNO, esp-istaj studentoj de altlernejo en Brno decidis dum sia kunveno, jenan proklalmon: „Se la homoj volas vivi en vera paco, ili nepre devas bone interkoni sin. Internacia rilato kaj interŝanĝo de spertoj kaj opinioj inter ĉiuj sociaj tavoloj kaj fakaj institutoj mondskale vere urĝas. Ni estas konvinkitaj, ke sukceson en tiu direkto povas alporti nur universala akcepto de Esperanto. Komprenante la altan signifon de morala paciĝo kaj unuiĝo de la homaro, kiu elkreskus el reciproka ekkono de la homoj ĉiulandaj, ni decidis ekagi por eluzi Esp-on en gravaj agadkampoj de homoj: scienco, tekniko, filozofio, arto ktp. Nia peranto estas k-do. Josef CINK, BRNO, Tvrdého č. 9, Ĉeĥoslovakio.

HRADEC KRÁLOVÉ, k-do. Zdeněk HRŠEL sukcesis varbi kvar novajn abonantojn por L. P. inter ili du el eksterlando.

NI VOKAS ĈIUJN ĈEĤOSLOVAKAJN GEKAMARADOJN SENDI AL NI REGULE RAPORTOJN PRI NIA MOVADO EN ILIA LOKO.

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S:

K-do. Ilja ANTONOV, Str. Ivan Nazov, n-o 9, GABROVO, Bulgario, kun ĉ. land.
K-do Eduard V. TVAROĚEK, redaktoro, Hviezdoslavova 2/III, Martin, Ĉeĥoslovakio, pri kultur. temoj precipe kun Islando, Norvegio kaj Mez-Ameriko, interŝ. fotobildkartojn kaj il. turism. prospektojn ĉ. l. Afr, fil.
K-do. Frantisek GALGOČI, MĚLČICE, Okres Trenĉín, Slov., Ĉeĥoslovakio, kun ĉiulandaj filatelistoj.
K-do. Ján HÁDMEK, lernejdirektoro, JAKARTOVICE okr. Opava, Ĉeĥoslovakio, ŝatas ricevi sciigojn kaj spertojn pri efikaj instrumetodoj al infan.
K-do. Filip Vasilev RUMANOV, st. 2, Gurko" 17, TIRNOVO, Bulgario, kun 16 ĝis 30 jaraj gek-doj pri ĉiu. temo.
K-do, Helmut TREPTE, Pestalozzistr. 11, RADEHEUL, Germanio-DDR(27-jara librotenisto) kun k-dinoj el ĉ. l.
K-dino. Katalin ZOMBOR, Felszabudulásútja 107, PECS Hungario (13-jara) kun ĉiuj landoj. Certe respondas.
ADRESŜANĜO: K-do. Stanislav WERNER antaŭe en TRUTNOV, loĝas nun en Téchotín č. 175,

pošta MLADKOV, ČSR
K-do. Ganĉo Jordanov GANEV, vil. TOPCII, reg Razgrad, Bulgario, pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.
K-do, Josef HOPF, NOVÉ SEDLO č. 98 u Lokte, Ĉeĥoslovakio, kolektas k. interŝ. maŝinskrib. Esp-revuojn k. Esp. revuojn el franclingva regiono kaj franclingvajn il. gaz. Rekompence manskribitaj tradukoj kaj filat. afr. leterojn.
K-do. A. G. PROVOST, rue Le sage 15, PARIS XXe, Francio, sendas Esper. stenografan revuon kontraŭ pago de 6 int. resp. kup. por jarabono.
K-lo Josef NOVÁK (soldato)P. S. 14 /24, (24, BÍLOVICE u  Uher. Hradiště, nur kun junularo el Ĉeĥoslovakio
K-do. Mária KOVÁCSEVICS, Felszabadulás ut. 73, PÉCS, Hungario/13jar/ kun ĉiuj landoj per il. p. k.
K-do. Rudolf BURDA, Palackého n. 6, PLZEŇ, ĈSR, vendas tute novan porteblan kofro-skribmaŝinon, marko "WAG" (germ. produkto) prezo: 1.800
UNU  KORESP. ANONCO KOSTAS 3,- Kčs
aŭ 3 int. resp. kuponojn. Kondiĉo: Respondu almenaŭ 1 foje per pk.

=====================================================================

<u>MUNICIO POR NIA BATLO</u>

| | |
|---|---|
| K-do. Cor de Waart-Plzeň | 5.- Kčs |
| K-do D-ro. Nigra-Plzeň | 10,- " |
| Esp-junularo Plzeň | 5,- " |
| K-do. Boh. Zíka Plzeň-Černice. | 1,- " |
| K-do Jiří Plachý, Plzeň . | 1.- " |
| K-do Mazan -Plzeň | 5,- " |
| K-du. Zikmund-Plzeň | 2,- " |
| K-do. Valenta-Plzeň | 5,: " |
| K-dino. L. Šloufová | 3. -" |
| K-do. R. Burda Plzeň | 10.- " |
| K-do. J. Mazurek-Uh. Hradiště. | 5. -" |
| K-do, J. Hadámek-Jakartovice | 2. -" |
| K-do. Václ. Růžiĉka-. Děčín | 7. -" |
| K-do. Jos. Řebíĉek-Olomouc | 5,- " |
| K-do. Oldř. ¨Kail, Mezouň | 20.-" |
| K-do. A. Macek, kan. Mikulov | 15. -" |
| K-do Nenomata | 16. -" |
| K-do. V. Kaplánek-Mar. Lázně. | 15,- " |
| K-doj, Kodytek-Berndt-N. Město | l0. -" |
| K-do. Is. Sabela-Orlová II | 8,- " |

Al ĉiuj ni tutkore dankas.
Koregan dankon al ĉiuj por 1a senditaj Kristnaskaj kaj Novjar-deziroj. Mi dankas ankaŭ por via kunlaboro. Ĝi daŭru ankaŭ en 1955! R. Burda

=====================================================================

<u>RECENZO</u>

"ROLOJ KAJ URTIKOJ" de Poul Thorsen, 117paĝa bele bindita poemaro de jam konata Esp-poeto. 8 poemoj estis premiitaj de diversaj belartaj konkursoj. La aŭtoro persone prezentis la eskiman parton prelege en Somera universitato Zagreb en 1953. Li estas prez. de Dana ekzamena komisio por Esp-o. 30 poemoj  estas origiraloj. La eldono similas miniaturan kolekton de dana antologio. La libron karakterizas plaĉa ekstero kaj tipografio. Ĝin ornamas 34 trafaj, ofte spritaj vinjetoj de Berge Hamberg. prezo : 10,50 dan. kr. aŭ 18 int. resp. kup. Aĉetebla ĉe: Komuna konversacia klubo, Randbelve j 4, ~HAGO P. Danlando.
El tiu libro eblas ĉerpi interesan programon por festaj vesperoj. Perfektaj esp-istoj povas ĝui rarajn vort- -kaj sent-esprimojn por kompletigi sian lingvoscion. Ni rekomendas ĝi por ĉiu biblioteko.

===========================================================================
Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPRRANTO, TATRA n, pr, KOPŘIVNICE,
Redaktis:K-do. Rudolf BURDA, Palackého nářadí ĉ. 6. PLZEŇ, Ĉ S R
Ĉ  E Ĥ O S L O V A K I O
==========================================================================